

La 19an de februaro 2014

Tokio kaj la ĉirkaŭaj gubernioj suferis pro neĝego



Mia domo matene de la 15a de februaro

Komenciĝis neĝi ekde matene de la 14a de februaro, do mi rezignis iri al Tokio por kunsido. Tage kaj nokte plu neĝis, kaj kiam mi ellitiĝis la 15an, la neĝtavolo jam estis nekredeble profunda. Plu neĝis, kaj fine la neĝtavolo en mia urbo fariĝis 73 centimetrojn profunda. Tio estis la rekordo en la pasintaj 120 jaroj.

Kutime en Tokio kaj la ĉirkaŭaj gubernioj laŭ Pacifika Oceano malofte neĝas. Do ni ne estis preparinta nin kontraŭ tiom da neĝo. Pro tiu neĝado dekkelkaj homoj mortis, multaj vilaĝoj estis/as izolitaj kaj transportado ne funkciis, do mankis varoj en vendejoj. Agrikulturo suferas multe. Varmdomoj estis rompitaĵoj kaj ĉiuj legomoj fariĝis nevendeblaj. Agrikultura Asocio en mia gubernio Gunma diras, ke la agrikulturo de Gunma estas sojle de malapero pro grandega damaĝo.

En somero kaj aŭtuno ofte atakas nian regionon tajfuno, sed la damaĝoj


estas partaj. Tamen ĉi-foje neĝis multege kaj en la tuta regiono, do la damaĝo estis grandega. Kiam okazis tiuj tertremo kaj cunamo en 2011, mia pola amiko skribis, ke Japanio estas kompatinda lando, suferante pro tertremoj, cunamoj, erupcioj, tajfunoj, nuklea akcidento. Li ne menciis neĝon, sed ankaŭ neĝo estas grava problemo en neĝaj regionoj, mortigante pli ol 50 homojn ĉiun jaron. Ĉi-foje neĝo atakis ne-neĝajn regionojn. Vere Japanio estas kompatinda lando !

Elektra Kompanio Ĉuubu intencas refunkciigi la Nuklean

Centralon Hamaoka

Por pli kompatindigi Japanion, Elektra Kompanio Ĉuubu (*Ĉuubu Electric Power Company, CEPCO*) petis refunkciigon de la nuklea reaktoro n-ro 4 en Hamaoka al Nuklea Reguligada Aŭtoritato la 14an de februaro. CEPCO nun konstruas kontraŭcunamajn digojn 22 metrojn altajn por la reaktoroj n-roj 3 kaj 4, aliajn instalaĵojn kaj ekipaĵojn, kaj diras, ke la reaktoro n-ro 4 estos preta por refunkciigo.

Tiu nuklea centralo Hamaoka situas ĝuste sur la zono de antaŭvidita grandega tertremo kaj ĉirkaŭ la centralo 960000 homoj loĝas en 11 urboj. Tuj post la nuklea akcidento de Fukuŝima, homoj timis alian tertremegon sub tiu centralo kaj la tiama ĉefministro ordonis (ĝuste petis) haltadon de tiu centralo.



Multaj diras, ke tiu centralo Hamaoka ne devintus estis konstruita. Certe la kompanio prezentis falsajn paperojn al la registaro kaj aprobis al ĝi la konstruadon. Tial, eĉ se CEPCO povus igi la centralon « perfekte sekura », ĝi neniam estus absolute perfekte sekura, ĉar ĝi situas sur tiel danĝeriga loko, do neniu scias, kio okazos al ĝi, kiam ĝin atakos tiu grandega tertremo.



CEPCO ne multe dependas de nuklea energio, do ĝi povos plej facile forĵeti nuklean energion. Kial ĝi insistas pri la refunkciigo? Kial ĝi ne havas kuraĝon esti la unua, kiu forĵetos siajn ĉiujn reaktorojn, el la 7 elektraj kompanioj posedantaj nukleajn reaktorojn ? Certe refunkciigo de la reaktoro en Hamaoka pli maltrankviligos la japanojn kaj plej certe pli kompanindigos Japanion pro eventuala akcidento.

Nove elektita guberniestro de Tokio estas por atomenergio

La elekto de la guberniestro de Tokio okazis la 9an de februaro, kaj s-ro Masuzoe Jooiĉi venkis, subtenate de Liberara Demokratia Partio, kiu intencas antaŭenpuŝi atomenergian politikon. Respektivaj kandidatoj akiris jenajn voĉojn:

Masuzoe :	2112978 (43,04%)
Ucunomija :	982594 (20,18%)
Hosokaŭa:	956063 (19,64%)
Tamogami:	610865 (12.55%)

Masuzoe kaj Tamogami estas por atomenergio kaj Ucunomija kaj Hosokaŭa estas kontraŭ. Do ŝajnas, ke jam pli ol duono de la Tokio-anoj forgesis la nuklean akcidenton en Fukuŝima kaj denove volas ĝui modernan vivon, uzante abundan elektron el nukleaj reaktoroj. La gvidanta LDP estas ĝoja pro la venko de Masuzoe kaj plu antaŭenpuŝos refunkciigon de multaj reaktoroj.

Ni ne povas eviti naturajn kataklismojn, sed kial homoj mem okazigas katastrofojn kiel nukleajn akcidentojn kaj militojn?

HORI JASUO